



Esperanto en Danio

21-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2017

103a UNIVERSALA

LISBONO 2018
28 JULIO – 4 AGUSTO



KONGRESO

de ESPERANTO



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae
Eremitageparken 17 st, C
2800 Lyngby
☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk
Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Finn Østerbæk (kasisto)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Arne Casper

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2018

Enhavo

UK en Lisbono.....	3
La kroniko en Politiken.....	5
Nekrologo.....	7
Trilanda Renkontiĝo.....	8
Pri malprudentaj asertoj.....	10
“Paralela Universo”.....	12
Esperanto en la Roskilde- Festivalo.....	13
Programo de KEK.....	14
Arta programo kun Esperanto- filmo.....	15
Kleriga posttagmezo en Kopenhago.....	15
Aktiveco en Århus.....	16
KUKS-Festivalo.....	17
La entombigo de d-ro Zamenhof	18
Dana versio de “Amikumu”.....	19
Bonvenon al Ameriko!.....	20
Tonkin ĉe la traduka servo de UN.....	21
Optimismo kun defio.....	22
Ekskurso en Nepalo.....	23
RevuServo 2018.....	27

UK en Lisbono

La kongresa temo de la venontjara Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono estas: “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?”. Jen kiel ĝi estas klarigita en gazetara komuniko de UEA:

Kiam la portugala maristo Vasco da Gama atingis la bordojn de Barato (por eŭropanoj, Hindio) antaŭ 520 jaroj, li malfermis novan epokon en la monda historio. Dum longa tempo tiu aspektis kiel epoko de la Eŭropa Konkero, ĉar la grandaj maraj imperioj de Britio, Francio, Nederlando, Hispanio kaj Portugalio sukcesis ekregi sur granda parto de la terglobo. Kun iliaj soldatoj, pastroj, komercistoj kaj burokratoj disvastiĝis ankaŭ la imperiaj lingvoj kaj kulturoj, influante la vivon de miliardoj da homoj, ne nur dum la zenito de la eŭropa potenco, sed ankoraŭ nun.

Tamen la procezo de tutmondiĝo ne haltis ĉe la starigo de la grandaj imperioj kaj iliaj kolonioj. Iom post iom, ŝajne nehaltigeble, ĝi interplektis ĉiujn homajn sociojn, tiel ke ankaŭ la originaj hejmlandoj de la koloniintoj fariĝis multetnaj, multlingvaj, multkredaj. Dume la progreso de la komunikaj teknologioj malfernis novajn kanalojn por la reciproka influado de socioj ie ajn en la mondo, disvastigante interalie la komprenon, ke ni ĉiuj loĝas sur unu malgranda planedo.



La kongresejo Reitoria da Universidade de Lisboa

Tiel, almenaŭ, ni ŝatus kredi – ni esperantistoj, internaciistoj, kredantoj kaj praktikantoj de la frateco de l’ homaro. Se ni rigardas ĉirkaŭ ni, tamen, ni vidas ke multaj homoj fakte timas tiujn vizion kaj realon de interplektita mondo, kaj rifuĝas al imagoj pri sia propra supereco, pri sia kapablo forfermi la fremdulojn. Lingvoj kaj kulturoj fariĝas bataliloj por tiuj homoj, rimedoj por distingi la amikon de la malamiko, pordoj kiuj enlasas

nur la elektitojn. Aŭ, eventuale, rimedoj por daŭrigi la kolonian regadon en aliaj formoj, formoj profunde integritaj en la mondaj ekonomia kaj politika sistemoj.

Kontraste al tiuj flankoj de la tutmondiĝo, diversaj sociaj movadoj kaj kulturaj tendencoj prezentas alternativan evoluvojon, al daŭripova mondo bazita sur justeco ekonomia kaj ekologia. Tiuj voĉoj estas ĉie rekoneblaj, foje eĉ influaj. Sed pri lingva kaj kultura diverseco ili ofte parolas nur svage kaj ĝeneralige, en la iamaj koloniaj lingvoj, supozante ke sufiĉas komunaj idealoj kaj valoroj por venki ĉiujn problemojn. Male al troa malfido pri siaj kunhomoj, ili tro multe fidis al sia kapablo forlumi la ombrojn de la historio. Kulturoj kaj lingvoj tamen, ĉiam kaj ĉie, kuntrenas la pasintecon kun si.

Kien, do, nun? Ĉu ni esperantistoj, kunposedantoj de lingvo kaj kulturo jam denaske tutmondismaj, povas disvolvi novan, konvinkan vizion pri la estonteco? Kaj kiel ni nutru kaj gvidu la evoluon de nia propra kulturo, por ke ĝi estu inda je tiu vizio? La kongresa temo de Lisbono donos al ni abundajn okazojn por preparoli la interplektiĝon de la esperantista vivo kun tiu de la mondo ĉirkaŭ ni, kaj interŝanĝi spertojn kaj perceptojn pri la plej signifaj lingvaj kaj kulturaj evoluoj de nia epoko. Venu navigi tiun maron kun ni!

La 103-a UK okazos de sabato ĝis sabato inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2018. **Atentu ke la kongresaj kotizoj plialtiĝos per 25% jarfine!** Valoras esti individua membro de UEA, ĉar la kongresa rabato por individuaj membroj de UEA estas pli granda ol la membrototizo.

Aliĝu ĉe nia Ĉefdelegito Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København. Konto reg. 1551 numero 1001 9621. Ankaŭ eblas aliĝi rekte ĉe uea.org/kongresoj/alighilo.

Notu cetere, ke venontjare SAS malfermos novan rektan flugon inter Kopenhago (Kastrup) kaj Lisbono!

La kroniko en Politiken



Kiel vi verŝajne jam scias, la 11-an de oktobro la kroniko de Politiken, unu el la plej grandaj taggazetoj de Danio, estis verkita de nia prezidanto. La gazeto elektis titoli ĝin “Rezignu pri la Angla – Esperanto estas multe pli bona”.

Ni gratulu al Peter Wraae pro ĉi tiu rimarkinda atingo, kaj tuta DEA rajtas gratuli sin mem. Ĉu ĉi tio estas turnopunkto? Ĉu eble aliaj faktoroj krom la diligento de Peter mem faciligis la akcepton de la kroniko ĝuste nun? Por esplori tion, mi konsultis <http://infomedia.dk> (pere de la Reĝa Biblioteko), kiu enhavas la tekstojn de la Danaj amaskomunikiloj de post 1990.

La artikoloj kiuj enhavis la vorton “Esperanto” dum 2016 estis similaj al tiuj kiujn oni vidis dum la antaŭaj jaroj: multaj rememoroj pri pasintaj gloraj tempoj, malmulte da efektivaj aktualaĵoj. Tamen rimarkindas ke estas eĉ ne unu nekrologo, male du intervjuoj esprimas intencon lerni la lingvon! Tio jam estas sufiĉe kuraĝiga en si mem, sed mi eksciis ankaŭ ke Esperanto estas menciita en du novaj libroj: “Sproget” (La lingvo) de Mikkel Wallentin kaj “Vredens ord” (Vortoj de la kolero) de geedzoj Bille. Tiuj libroj kaj iliaj aŭtoroj meritas iom pli detalan prezenton.

Mikkel Wallentin estas aŭtoro de tri romanoj kaj de kelkaj teatraĵoj, sed ankaŭ lektoro en Århus pri cerboscienco. Lia scienca laboro esploras unuavice la lingvan funkciadon de la cerbo. Lia verketo “La lingvo” estas ero de “Tænkepauser” (Penspaŭzoj), eldonata de la universitato de Aarhus. Tiu serio konsistas el treege mallongaj kaj legeblaj libroj, kiuj tamen estas je la plej alta scienca nivelo.

Pri Volapuko kaj Esperanto Wallentin havas kvar alineojn. La prezento estas tre objektiva kaj favora, ekzemple li taksas la nombron de denaskaj esperantistoj al 2000. Nur la fino estas iom oblikva; menciante la Ido-krizon (ne menciante Idon) li asertas ke Esperanto viktimiĝis al tiu “lingvofetiĉismo”, kiun kontraŭbatali estis ĝuste la celo de la lingvo. Oni preferus la informon ke la aktiveco de Esperanto estas verŝajne centoble pli granda ol tiu de ĉiuj ĝiaj (planlingvaj) konkurantoj kune. Tiupunkte la

fina venko realiĝis jam antaŭ longe. Se esperantistoj vere kulpas pri ia fetiĉismo, praktike tio povas problemiĝi sole rilate al naciaj lingvoj.

“Vortoj de la kolero” estas tute alispeca libro: 333-paĝa romano, kvara en la serio de krimromanoj pri Thea Vind. Kaj tamen ne tute alispeca, ĉar la figuro Thea estas sciencojurnalisto same kiel la aŭtorino Lisbeth A. Bille; la alia aŭtoro Steen Bille laboras interalie kiel gastiganto en la tutlanda radio P1. En sia retpaĝo ili diras ke iliaj romanoj “baziĝas sur fundamento de rakontemo kaj fideleco rilate al faktoj”. Kaj almenaŭ ĉi tiu libro montras ke tio estas taŭga recepto por krimromano.

La murdoj okazas en planlingva medio. Tiu estas plene fantazia: temas pri ekologia kolektivo kie oni inter si decidis uzi “novskandinavian” lingvon (“Nyska”). Pro la intrigo Nyska devas esti nekomprenebla al Danlingvanoj, kaj tio devigas la aŭtorojn prisilenti la klopodojn de la Dana aŭtoro kaj juristo Sven Clausen, kiu dum la jardeko 1938-1948 agitadis por *Samnordisk*, komuna skriba normo por la tri Skandinavaj lingvoj.

La fikcia “Nyska” estas bona preteksto por prezenti aron da informoj pri planlingvaj faktoj, ĝenerale absolute ĝustaj. Mi trovis nur unu misinformeton kies ĝustigo ne difektus la intrigon: Thea iras intervjui la unuan denaskan parolanton de Esperanto, kiu estas Dano. Efektive nia unua denaskulo certe vivis aliloke kaj delonge mortis en alta aĝo.

La festivalo en la romano estas karakteriza pri ĝia mikso de fakto kaj fantazio: ĝi okazas en Bella-Centret (kiel la UK en 2011), sed la festivalo estas por ĉiuj planlingvoj! Esperanto kaj ĝia nombra supereco estas menciitaj, sed ĝenerale rolas nur fone. Unuflanke Esperanto estas tiom konata en Danio ke informoj pri nia komunumo ne estus sufiĉe kuriozaj, sed aliflanke nia medio ne estas tiel konata kaj granda ke ĝi en si mem povus porti Danan romanon, kaj tiom malpli krimromanon kun murdoj.

Ĉi tiuj ekzemploj de malkreskanta skeptiko al Esperanto kaj similaj lingvoj kompreneble havas Usonajn radikojn. Dum malkreskas la nombro de lingvoj en la reala mondo, Holivudo nun povas nutri almenaŭ unu plentempan kreanton de novaj lingvoj por fantaziaj filmoj. La komenco en 1979 estis fojfoja apero de Klingono en la filma serio *Star Trek*; la nuntempa popularega televida serio *Game of Thrones* aŭdigis tiom da dialogoj en *Dothraki* kaj *Valyrian* ke laŭkalkule tiuj lingvoj estas aŭditaj de pli da homoj ol la Kimra, Irlanda kaj Skotgaela sume!

Malfacilaj tempoj por tiuj kiuj volas insisti ke ne povas kreiĝi kulturo en ‘artefarita’ lingvo ...

Nekrologo



Århus Esperantoforening perdis sian prezidanton. Post plurjara malsano, preskaŭa resaniĝo, sed bedaŭrinda reveno de malsano, Stanislaw nun perdis la lukton kontraŭ kancero kaj forpasis la 29-an de oktobro 2017.

Stanislaw Mielczarek naskiĝis en Pollando en 1942, eklernis Esperanton en 1956 kaj en 1970 translokiĝis kun sia edzino Henryka al Danio, laŭ invito de Betty Larsen, do pere de Esperanto. Stanislaw tuj iĝis membro de Århus Esperantoforening kaj aktivis pri Esperanto, loke kaj lande, interalie kiel estrarano de DEA kaj prizorganto de Prelegvojaĝa servo.

En 1997 la membroj de ÅEF finfine konvinkis Stanislawon, ke li estas la plej taŭga kandidato por esti prezidanto de la klubo. Kial li hezitis? Pro tio ke li ne estis denaska dano! Fakte tio estis avantaĝo, pro lia bonega Esperanto kaj sen-danakĉenta elparolo.

Dum la lastaj 20 jaroj ÅEF profitis de tre kompetenta prezidanto, kiu kapablis agi same pri eksteraj kiel pri internaj rilatoj. Stanislaw aranĝis kursojn, plurfoje prelegis, estis intervjuita, lastfoje ĉisomere en radio-programo kun Tobias Nowiak. Li ĉiam kaptis la okazon informi pri Esperanto, ekzemple dum la someraj ekskursoj de ÅEF. Li rakontis kiuj ni estas, kio estas Esperanto ktp.

Stanislaw zorgis pri interesaj klubvesperoj kun diversaj programeroj, por ke estu taŭga enhavo por ĉiuj membroj, komencantoj, progresantoj kaj spertaj parolantoj. Ofte li prezentis mallonge iun lingvan aŭ gramatikan demandon. Stanislaw ankaŭ aktivigis nin, instigante nin prepari programeron por klubvespero. T.e. prelegoj pri iu Esperanto-rilata temo, pri partopreno en kurso aŭ kongreso, pri turisma vojaĝo aŭ ŝatokupoj kiel ŝako kaj desegnado.

La someraj ekskursoj estis ĉiujaraj eventoj, pri kiuj Stanislaw multe okupiĝis. La plej spektakla somera ekskurso estis la plurtaga vojaĝo al Pollando, kiam ni vizitis la plej, laŭ Esperanto vidpunkto, interesajn lokojn, ĉefe Bjalistokon. Stanislaw faris grandegan laboron planante tiun tre sukcesan vojaĝon.

Stanislaw havis specialan talenton pri membroflegado. Li ne nur kaptis novajn membrojn, sed ankaŭ zorgis pri tenado de tiuj membroj, kiuj jam estas, vizitante ilin aŭ telefonante al ili. Instigo de la prezidanto partopreni

klubvesperon ofte helpis plialtigi la nombron de partoprenantoj.

Ankaŭ lia familio partoprenis klubajn aktivecojn. Henryka kaj lia filo Andreo mem estas membroj de AEF kaj lia filo Petro partoprenis kun siaj gepatroj la ĉi-jaran somerekskurson al Kolding. Niaj pensoj iras al la familio de Stanislaw. Ankaŭ la klubo devos trovi sian vojon sen li.

Grethe Kvist, kasisto de Århus Esperantoforening

Trilanda Renkontiĝo

Vojaĝu kaj kongresumu kun najbaroj

Nia venontjara kongreso estos nova sperto por plej multaj el ni. Ni kune kun niaj najbarlandaj samideanoj vojaĝos per la DFDS-ŝipo *Pearl Seaways* inter Kopenhago kaj Oslo. Pro niaj diversaj loĝlokoj, la svedoj devas elekti en kiu haveno komenci la vojaĝon, ĉu en Kopenhago ĵaŭde la 10-an de majo por reveni en Kopenhago la 12-an, ĉu de Oslo la 11-an por reveni tie la 13-an. Ni do ĉiuj estos kune dum la vojaĝo de Oslo al Kopenhago kaj tiam havos la jubilean programon. La jarkunveno de DEA okazos survoje al Oslo.

Pro tio ke la surŝipa konferencejo laboras nur ĝis la 20-a horo vespere, kaj ni devos adaptiĝi al la ofertitaj manĝohoroj, niaj konferencoj/kunvenoj devos okazi dum la posttagmezoj. Ni do devos veni al la ŝipo plej malfrue je la 14-a horo (prefere je la 13-a) por havi la kunvenojn antaŭ la vespermanĝo. Pli detala horaro venos en la venonta numero de EeD kaj en nia retejo esperanto.dk.

En la konferenceja sekcio de la ŝipo sur la 11-a etaĝo troviĝas pluraj ĉambroj de diversaj grandecoj. Ni mendos ĉambrojn depende de la nombro de partoprenantoj. Dum la tuta tago oni en tiu sekcio ofertas senpagan kafon, teon, akvon, fruktojn kaj salaĵojn.

Matenmanĝon kaj la vesperan bufedon vendrede ni prenos en la restoracio *7 Seas*. Vespere ni sidos kune ĉe apartaj tabloj, sed tio ne estas organizebla por la matinmanĝo. (Homoj vekiĝas ĉe malsamaj horoj, ĉu ne?)

La tri-pladan “societan” menuon ni havos en la restoracio *Marco Polo*, kie eblos havi apartan ĉambron se ni ne estos tro multaj.

Por la libera babilado en pli malgrandaj grupoj ni povos elekti kafejon kaj vin-trinkejon kie ne estos brua muziko, por tiuj kiuj ŝatas bruan muzikon estas aliaj lokoj (noktoklubo, diskoteko). Kazino ankaŭ troviĝas.



Ekskursoj en Kopenhago kaj Oslo

DEA ofertas du ekskursojn en Kopenhago. La du grupoj tagmanĝos kune, prezo 100 DKK.

Ni iros per aŭtobuso de la ŝipo cirkaŭ la 10-a horo al stacio Nørreport (centre de Kopenhago). Bonvolu kunporti pluvombrelon se la vetero ŝajnos malseka.

1. En la piedspuroj de Zamenhof. Gvidos Bent Jensenius.

Ĉi tiu ekskurso estas por homoj kiuj ne ŝatas piediri longe. Parto de tiu ekskurso estas havena rondiro per boato (aktuala prezo 40 DK kr) kiu daŭros unu horon. Dum la promonado ni vidos kie Zamenhof estis dum sia vizito en Kopenhago. Ni reiros de Nørreport je 14.45.

2. Esperanto en la publika spaco de Kopenhago. Gvidos Jens S. Larsen.

Ĉi tiu ekskurso estos promeno reen al la ŝipo, kaj daŭros ĉ. 4 horojn. Dumpromene ni vizitos monumentojn de homoj kiuj gravis en la historio de Esperanto kaj de mondolingvo entute. Ĉe ĉiu monumento estos prelegeto, kaj ĉe la lasta (la tombo de Margrethe Noll) estos pli longa konkluda prelego.

En Oslo la ŝipo kuŝos je piedira distanco de la proponitaj celoj de ekskurso kaj la propono estas

10.00 promeno al Oslo Rådhus tra Akershus festning

11.00 gvidado en Oslo Rådhus

11.45 oficiala akcepto en la urbodomo

12.00 lunĉo en la kafejo samloke

12.40 reen al la ŝipo

14.00 jubilea aranĝo en la ŝipo


Se la urbodomo estus fermita, tiam ni eble povus viziti la Nobelan Pac-Instituton peti gvidadon tie.

La prezo por la tri tagoj estos ĉirkaŭ 1900 DKK. Por unulita kajuto estas kromkosto de proks. 320 DKK.

La prezo inkluzivas:

- la ŝipvojaĝon
- tranoktadojn en dupersona kajuto (kromkosto ĉirkaŭ 320 DKK por unulita kajuto)
- 2 matenmanĝojn
- 1 tagmanĝon inkluzive bieron, vinon aŭ akvon
- tripladan festmanĝon (sen trinkaĵoj) kaj aliro al konferenca ĉambro dum la transpaso.

Pri malprudentaj asertoj



La 6-an de januaro 2005 mi ŝaltis la komputilon kaj eklernis la lingvon Esperanto.

Dum la unuaj du semajnoj de la lernado mi diris nenion al iu ajn pri la nova intereso. La tagon kiam mi informis la familion pri ĝi, ili tuj asertas, ke tia decido finfine pruvas, ke Avinjo estas strangulino, kaj gemikoj mire demandis min, kial mi intencos malŝpari la tempon. Indigne mi replikis:

“Esperanto estas genia, utila, bela, facila, neŭtrala kaj paca lingvo. Ĝi devus esti ĉies lingvo internacia, kaj per ĝi ni savu la mondon. Neniam mi bedaŭros la decidon eklerni ĝin.”

Saĝe silentis ĉiuj – ju malpli da diroj, des pli frua la resaniĝo.

Post 12 jaroj mi ankoraŭ ĉiutage iel esperantumas. Legante, skribante, retumante kaj babilante kune kun esperantistoj en Danio kaj eksterlande mi ankoraŭ estas konviktita, ke taŭgas la lingvo Esperanto. La gekaraj miaj ankoraŭ dubas sed silentas. La stranga grilo ne ĝenas ilin kaj tia estas Avinjo.

Memorante miajn unuajn reagojn mi devas konstati, ke intertempe miaj opinioj moderiĝis. Jes, mi ankoraŭ opinias, ke la lingvo estas genia, utila kaj bela. Ties utilecon mi vere aprezas. Pro la kontaktoj kun aliaj esperantistoj mi multe vojaĝis kaj profitis de ilia ĉiĉeronado en Pollando, Ukrainio, Hungario, Kroatio, Litovio, Germanio, Turkio, Israelo, Francio

kaj Nederlando. Kvankam neniu malhelpis min vojaĝi sen la helpo de esperantistoj, mi opinias, ke la travivaĵoj kune kun ili estis pli interesaj kaj intimaj ol sen ilia helpo. Dum vojaĝoj per Esperanto oni spertas la ĉiutagajn vivmanierojn, kiu estas tiel valora kiel la vizitoj al vidindaĵoj.

Miaj spertoj kiel gastiganto pasportaserva estas memorindaj kaj tre utilaj el lingva vidpunkto. La unuaj gastoj de Ĉinio kuiris ĉine en mia kuirejo kaj sukcese instruis al mi la arton manĝi per manĝobastonoj. Gastino de Japanio nesukcese sed pacience instruadis al mi la arton de origamo. Dum ŝtormo mi akompanis kvin ruslandajn junulojn al la marbordo, ĉar ili neniam antaŭe vidis la maron. Atinginte la marbordon ili tuj demetis la ŝuojn kaj ektempigis en la glacian akvon.

Tamen mi ruĝiĝas memorante kelkajn el la aliaj asertoj. Ekzemple: “Esperanto estas facila lingvo.” Post la eldono de la unua libro kaj ties 16 reguloj Zamenhof ricevis tiom da demandoj de adeptoj pri la uzado de la reguloj. La respondojn oni povas legi en lia 124-paĝa libro “Lingvaj respondoj: konsiloj kaj opinioj”. Post cent jaroj saĝuloj daŭre penadas komprenigi nin pri la gramatiko, ekzemple, per la 696-paĝa Plena manlibro de Esperanta Gramatiko. Ĝi ne estas facila lingvo, ĝi estas iom pli facila lingvo ol ekzemple la dana aŭ la angla, ĉar la gramatiko estas regula.

Mi ne plu asertas, ke Esperanto estas “neŭtrala” lingvo. Anstataŭe mi diras, ke Zamenhof dezajnis la lingvon uzante strukturojn kaj vortojn, kiujn laŭeble plej diversaj lingvanoj povus relative senprobleme akcepti kaj enkapigi.

Ludoviko Zamenhof kreis la lingvon kiel pacigilon kaj komprenigilon, sed certe eĉ pli gravaj al li estis la dogmoj de homarismo. Sed tio ne signifas, ke ĉiuj Esperanto-parolantoj samopiniis pri tiuj celoj. Pro tio mi ne plu asertas, ke Esperanto estas paca aŭ paciganta lingvo. Plue, kvankam multaj esperantistoj estas pacemaj kaj agadas je paco, Esperanto ne estas la sola lingvo, per kiu oni povas tion fari. Parolantoj de iu ajn lingvo povas esti pacaj batalantoj. Cetere povus esti ke troviĝas elstaraj Esperanto-parolantoj, kiuj kaj estus malpacaj batalantoj kaj havus malhonestajn celojn per la lingvo.

Ĉu ĝi devus esti ĉies dua lingvo? Tio certe estus bona ideo. Se tio iam okazus, tiam la internacia kunlaborado faciliĝus. Tamen tio certe ne okazos dum mia vivo.

Ĉu ni savu la mondon per Esperanto, kiel mi asertis antaŭ dekdu jaroj? Mi opinias, ke ne. Ĝis tiam, kiam la homaro emos kaj pretos solvi tiajn

problemojn kiel malegaleco, malriĉeco, disputoj pri landlimoj ktp, eĉ parolante per Esperanto oni solvos nenion. Tamen mi ankoraŭ esperas, ke per ĝia disvastigo oni konsciigos ĉiam pli da homoj, ke per Esperanto oni povas pli facile amikiĝi kaj interkompreniĝi.

Pri la finfina aserto, mi ĵuras al vi, mi neniam bedaŭros la decidon eklerni Esperanton.

Betty Chatterjee

“Paralela Universo”

La Paralela Universo estis lanĉita en Usono en aŭgusto 2016. La ideo estis, ke en la sama tago okazu esperantistaj renkontiĝoj en diversaj urboj. Multaj novaj usonaj esperantistoj lernas la lingvon pere de la reta kurso de Duolingo, kaj pro tio ili plejparte konas neniujn esperantistojn en siaj propraj urboj. La pasintjaraj aranĝoj estis grandaj sukcesoj. Tial ĉi-jare la aranĝantoj decidis proponi al esperantistoj en aliaj landoj, ke ili renkontiĝu okaze de la ĉi-jara tago Paralela Universo.



Bent Jensenius kaptis la ideon, kaj tial la 9-an de aŭgusto dek kopenhagoj partoprenis aranĝon en Kopenhago. Ni renkontiĝis je 12-a en la restoracio RizRaz, kie ni per skajpo unue agrable babilis kun moskvaj esperantistoj, kiuj renkontiĝis en la hejmo de Anna Striganova kaj Dimitri Ŝevĉenko. Ĉiuj ĉeestantoj iel partoprenis la konversacion.

Post la babilado ni manĝis tre bongustajn pladojn vegetarajn. Post la manĝo ni piediris al la parko de H.C. Ørsted, kie ni kafumis, babilis kaj ĝuis la belegan veteron.

Betty Chatterjee

Esperanto en la Roskilde-Festivalo

Dum la plej granda rok-festivalo de Danio, Roskilde Festivalo, inter la 24-a de junio kaj la 1-a de julio kaj kun pli ol 100 000 partoprenantoj, nia “eta” grupo de 60 homoj faris laboron por la festivalo – ĉi-jare denove kiel gardistoj de pordego 19 – unu el la grandaj enirejoj inter la tendaro kaj la koncertejo.

Ni havis tre sukcesan kunlaboron. Ni laboris por Roskilde kaj por Esperanto, disdonis informilojn pri Esperanto al la festivalanoj – interalie etan frazlibron titolitan “Festivalparlør dansk-esperanto” kie festivalanoj povis lerni kelkajn amuzajn kaj utilajn frazojn en Esperanto.



En nia “bazejo”, kiun ni mem konstruis en loko provizita de la festivalo, ni manĝis vegane kaj Kim Henriksen instruis Esperanton al la komencantoj. La bazejo estis nia propra loko por ripozi kaj interkonatiĝi en relative luksaj kondiĉoj. Tie ni povis uzi kaj praktiki Esperanton parole kaj etose.

Okaze de nia aktiveco unu el la organizantoj, Rasmus Højrup Jensen, estis en la Dana Nacia tutlanda televido (TV-Avisen 21:30) en 3-minuta programero – videbla ĉe <http://youtu.be/pSHnPCabzfw>.

Ni tre ĝuis la festivalon kaj ripetos la sukceson venont-jare – kaj vi povas jam nun aliĝi ĉe <http://roskildefestivalo.dk/>. Ĉiuj bonvenas, sendepende de lingvokono.

Jacob Nordfalk

Programo de KEK

“Konversacia Esperanto-Klubo” regule kunvenas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV, lunde je la 19.00 horo. Eniru tra la malantaŭa enirejo ĉe la parkejo. Premu butonon en la dekstra muro por malfermi la pordon aŭ voku 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

6. novembro: Vikipedio. Ni vidos ĉu iu kontribuis ion de post la unua programero pri tiu temo.

13. novembro: Babila Vespero. Venu babili pri ĉio aŭ nenio.

20. novembro: Studgrupo. Gvidas Betty Chatterjee.

27. novembro: Lumbild-prelego pri Latvio. Gvidas Bent.

4. decembro: Vikipedio. Daŭrigo de la dua programero de tiu temo.

Sabaton la 9-an de decembro je la 14-a horo:

ZAMENHOF- FESTO

La estaro de DEA kaj KEK invitas ĉiujn esperantistojn al nia tradicia Zamenhofa festo. Ĝi okazos en la kutima kunvenejo, Tomsgårdsvej 35.

Ni servos kafon/teon kaj kukojn, diversaj personoj distras diversmaniere kaj ni kantas kristnaskajn kantojn.

Verŝajne diversaj muzikistoj muzikumos.

Enirpago 30 kr.

OBS! INFANOJ APARTE BONVENAS.

Amike

La estaro de DEA/KEK

P.S. La libroservo akceptas MobilePay.

Arta programo kun Esperanto-filmo

La arta projekto *Bodies Beyond Borders* prezentas ampleksan programon la 17-an kaj 18-an de novembro en Warehouse9, Halmtorvet 11A.

La ĉefa okazaĵo (almenaŭ se oni juĝas laŭ la prezoj) estas la dokumenta filmo *Plena Rondo*. Japanino faris jenan eksperimenton: dum 60 tagoj ŝi devis lerni esperanton uzante nur senpagajn lernilojn. Pro tiu eksperimento ŝi vojaĝis de Japanio al Argentino.

Daŭro de la filmo: 72 minutoj.

Ligilo al la filmo (*videbla en Warehouse9 vendrede la 17-an je la 20.00 horo*):

<https://www.osbornmoller.org/plena-rondo-leaving-language>

Prezentfilmeto pri la filmo: <https://www.plenarondo.com/>

La filmo estas nur en la angla, sed kelkaj el la aliaj eventoj de la programo estas kun iom da tradukado al la dana.

Ligilo al la tuta programo: <https://www.osbornmoller.org/program> (vidu la superrigardon alklakante la PDF-ikonon).

Se la poŝto sukcesis enmanigi al vi ĉi tiun numeron de EeD sufiĉe frue, jen ligilo por mendi biletojn al la filmo Plena Rondo je rabatprezoj uzante la kodon esperantoDK: <http://bit.ly/2h8FLzz>

Eblas rezervi senpagan bileton por la evento 'States of Fiction' (18.00-19.30) je ĉi tiu ligilo: <http://bit.ly/2yr8hq3>.

Notu ke la trinkejo estas malfermita tuj post la filmo de 21.15 ĝis 24.00.

Kleriga posttagmezo en Kopenhago

“La migdalo estis manĝita tuta.” – “La migdalo estis manĝita tute.” Ĉu tiuj du frazoj signifas la samon? “La kuracisto helpis lin sanigi lin.” – “La kuracisto helpis lin sanigi sin.” Kio estas la diferenco inter tiuj du frazoj? “Li kisis ŝi, sed ne li.” Ĉu vi povas traduki tiun frazon?

La respondojn ni trovos sabate la 20-an de januaro 2018 de la 13-a ĝis la 17-a horo en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, Kbh NV. Tiam kaj tie ni okazigos malgrandan klerigan posttagmezon, dum kiu ni pritraktos kelkajn ofte aperantajn gramatikajn problemojn. Gvidos la kurseton Peter Weide. Atentu: Vi estas tre bonvena skribi al li (peter.weide@mail.dk) kaj proponi temojn, pri kiuj vi ŝatus scii pli.

Post la kurso ni veturos al Riz-Raz por tie kune vespermanĝi.

Aliĝu antaŭ la 6-a de januaro 2018 ĉe Peter Wraae: peter@wraae.dk.

La kotizo por la posttagmezo estas 50,- DKK, pagenda antaŭ la komenco de la aranĝo kontante aŭ per mobilpay. La kotizo ne kovras viajn elspezojn por la vespermanĝo.

Aktiveco en Århus

La prezidanto de Århus Esperantoforening Stanislaw Mielczarek aktivis ĝislaste. La 26-an de aŭgusto li informis la membraron:

Kunvenplano 2017.2

Esperante, ke vi ĉiuj havis agrablan somerferion ni invitas vin partopreni en la aŭtun/vintraj klubkunvenoj.

Jen la plano de la kunvenoj – 2017/2 :

24.11.2017: Mia Nordentoft rakontas pri sia vojaĝo al Slovakio

15.12.2017: Zamenhof- kaj Kristnaskofesto

La 12-an de aŭgusto okazis Somera ekskurso 2017. Tove Bak kaj aliaj koldinganoj invitis nin al Kolding. Ni estis 20 partoprenantoj. Bedaŭrinde la vetero ne estis bona, pluvis. Tamen la etoso estis bona. Precipe la komuna teo- kaj kaŝtrinkado kun kukoj ĉe Tove Bak estis agrabla travivaĵo. Dankon al la aranĝintoj!

La 25-an de aŭgusto telefonis al mi Jesper Dein el Dana Radio, Kopenhago kaj demandis pri la ebleco intervjui min la sekvan tagon.

La 26-an 2017, la datrevenon, kiam antaŭ 130 jaroj aperis la unua Esperanto-lernolibro, mi havis okazon diri kelkajn vortojn al la danaj aŭskultantoj. Mi iris al la aarhusa radiostudio kune kun Tobias Nowak, nia nova klubano, kaj proponis al Jesper Dein intervjui ankaŭ lin.

La intervjuon vi povas aŭskulti klakante la suban ligilon:

<http://www.dr.dk/radio/p1/p1-eftermiddag/p1-eftermiddag-2017-07-26>

KUKS-Festivalo

Vendrede la 27-an de oktobro okazis la solena festivalo okaze de la tago de Unuiĝintaj Nacioj. La festivalo okazas ĉiujare en la salono de la Urbo-domo en Kopenhago. Ni estas unu el la membroj de KUKS (*Komiteo for Udlandsforeningers Kulturelle Samvirke*) kaj ricevas la inviton kiun ni transdonas al niaj membroj. En la foto vi povas vidi niajn ĉi-jarajn partoprenantojn.



Krom la tre bongustaj manĝaĵoj kiujn dudeko da ambasadoj disponigas al la partoprenantoj kun naciaj specialaĵoj, oni povas ankaŭ ĝui la kulturalan programon, kies ĉefaj spektakloj estis tre ĉarma kaj eleganta danco de Indonezio kaj la fama koruso “La mondaj sirenoj” kiuj kantas en multaj lingvoj, interalie ankaŭ en Esperanto.

Ileana Schrøder



La entombigo de d-ro Zamenhof

El “Esperanto-Raporto” de CDEL (la tiama DEA), junio 1917:



La tombo de Zamenhof en Varsovio. La nuna tomboŝtono datiĝas de 1926.

La Kondolenco de la Danaj Esperantistoj al la familio Zamenhof.

Sciiĝante la morton de Dro. Zamenhof »Centra« tuj sendis sekvantan telegramon al Sino Zamenof pere de »Germana Esperanto Servo«:

»Alle dänischen Esperantisten trauern mit Ihnen über den Verlust unsres lieben Meisters«.

Por la okazo, ke la telegramo ne atingus Sinon Z., estis samtempe sendata letero, kiu sekvas:

Kun la plej profunda doloro ni sciiĝis pri la morto de nia kara Majstro, kaj ni petas vin akcepti la certigon, ke ni danaj esperantistoj profunde el niaj koroj funebras kun la tutmonda esperantistaro, kaj ni sendas al vi kaj al viaj infanoj niajn plej simpatiajn pensojn.

Bedaŭrinde pro la cirkonstancoj ni ne povis honori nian amatan Majstron eĉ per la plej malgranda floro sur lia ĉefko aŭ sekvi lin ĝis la lasta ripozejo, sed ni esperas, ke el niaj unuiĝintaj fortoj kreskos floro, kiu estos inda honoro al li, al kiu ni ŝuldas dankon dum nia tuta vivo.

La floron, kiun ni en la spirito submentas hodiaŭ sur la ĉerkon de nia Majstro estas liaj propraj vortoj:

- » Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali
- » por reuigi l' homaron --

kaj kun lia neforgesebla imitinda ekzemplo antaŭ la okuloj ni daŭrigos lian laboron por tiu granda celo.

Eterne memorata kaj benata estu li la granda pacifisto, la granda bonfaranto de l'homaro, la kreinto de Esperanto!

Je la nomo de ĉiuj danaj esperantistoj salutas

Centra Dana Esperantista Ligo.


Klarigoj: Zamenhof forpasis la 14-an de aprilo 1918. Ankoraŭ daŭris la unua mondmilito, kaj Varsovio estis sub germana okupado; tial ne eblis rekte tien sendi telegramojn, kaj ĉiuj komunikaĵoj devis esti en la germana lingvo. “Germana Esperanto Servo” estas preskaŭ forgesita hodiaŭ, sed laŭ Vikipeido ĝi estis la nomo de “strukturo por organizi la propagandon por la germana versio de la eventoj dum la Unua Mondmilito.”

Dana versio de “Amikumu”

La poŝtelefona aplikaĵo “Amikumu” nun, danke al la junulara sekcio DEJO, haveblas ankaŭ en la dana lingvo. Ĝis nun nur en Esperanto kaj aliaj naciaj lingvoj oni povis uzi ĝin.

Amikumu permesas al ĉiuj siaj uzantoj facile trovi aliajn parolantojn de ajna lingvo en la proksimeco. Ĝis nun ĝi estis ĉefe uzata de esperantistoj, almenaŭ en Danio, kaj tio estis parte tial, ke mankis al ĝi versio en aliaj lingvoj. Kun la nova aldono de la dana lingvo, ni esperas ke ankaŭ ne-esperantistaj danoj ekuzos ĝin. Tiamaniere ankaŭ ili konscios pri Esperanto pro ĝia vasta ĉeesto en ĝi.

La aplikaĵo estas senpage elŝutebla en Google Play por Android kaj en AppStore por iOS.



Bonvenon al Ameriko!



9-a TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Havano, Kubo / 11-17 februaro 2018

“Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj”

Havano 2018: veni, kongresi, amikumi en tutamerika etoso.

La 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto estas evento kunorganizata de Kuba Esperanto-Asocio kaj la Amerika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi naskiĝis kiel forumo por la regiona agado kaj estas la ĉefa kongreso kiu celas ne nur arigi la esperantistaron de Ameriko, sed ankaŭ esperantistojn el la tuta mondo kiuj iel volas subteni kaj kunpartopreni la regionan agadon.

Havano levas denove la torĉon kaj entuziasme la kubaj esperantistoj laboras por sukcesigi nian regionan kongreson. Ĝia ĉefa celo estas pli-vastigi la kunlaboron inter landaj movadoj de la Amerikoj kaj ankaŭ direkti la atenton al konservado kaj interesiĝo pri Esperanto flanke de grupoj kaj izoluloj en landoj sen organizita strukturo aŭ malforta movado, kiuj bedaŭrinde pluras en nia mondoparto.

Tial Havano invitas ĉiujn veni, kongresi, amikumi kaj kontribui al pli-fortigo de nia komuna agado, tio estas, disvastigi Esperanton, kunlabori kaj ĝui nian kulturan vivon.

Jen nia alvoko al vi!

Vi estas bonvenaj en Havano, la kuba ĉefurbo, la venontan februaron, inter la 11-a kaj 17-a, sed ankaŭ antaŭ- kaj postkongrese.

La kuba esperantistaro atendas vin!

*Maritza Gutiérrez González, Prezidanto de
Kuba Esperanto-Asocio*



Tonkin ĉe la traduka servo de UN



La reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj estas Humphrey Tonkin, Brita profesoro pri literaturo loĝanta en Usono. La 17-an de oktobro 2017, je invito de la direktoro de la Dokumentada Fako de UN s-ino Cecilia Elizalde, li prelegis ĉe la Tradukaj Servoj de UN pri “La Graveco de Lingvoj en la Tagordo de UN”.

Tonkin emfazis, ke la oficistoj de UN, ekster la lingvaj servoj, emas subtaksi la gravecon de lingvoj ne nur ene de la strukturoj de UN sed ankaŭ en la programo de internacia evoluigo. “Bedaŭrinde la lingvaj servoj de UN foje kompareblas kun la UN-sidejaj akvotuboj,” li asertis: “dum ili funkcias, neniu laŭdas la tubistojn; sed se ili misfunkcias, ĉiu plendas.” Li atentigis pri la fakto, ke lingvoj entute ne menciigās inter la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, nek inter la 169 “celtabuloj” kiuj akompanas ilin.

Aliflanke, li notis, ke en UN kreskas la interesiĝo pri multlingvismo. En majo, rezolucio de la Ĝenerala Asembleo kreis novan Internacian Tagon de Tradukado, kiun oni festos ĉiujare la 30-an de septembro; kaj nova rezolucio pri multlingvismo, akceptita de la Ĝenerala Asembleo kaj baldaŭ aperonta en sia fina formo, emfazas la gravecon de dialogo – do ne nur unudirekta komunikado – en la daŭrigeblo de la agado de UN, kaj atentigas pri la valoro de scipovo kaj utiligo ankaŭ de lokaj lingvoj, aldone al la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Asembleo.

Li same atentigis, ke lingva diskriminacio kaj ĝia forigo estas aferoj ne nur de identeco (oni ne diskriminaci kontraŭ homoj pro la lingvoj kiujn ili parolas, same kiel oni ne diskriminaci pri ilia haŭtkoloro aŭ sekso) sed, multe pli grave, aferoj de komunikado (oni ne uzu lingvojn kiujn la alparolatoj ne komprenas, sed serĉu lingvojn komunajn al ĉiuj, en kiuj plena kaj dudirekta komunikado povas okazi).

La menciita rezolucio pri multlingvismo proponas ankaŭ, ke oni inventaru la lingvajn kapablojn de la pli ol 40.000 dungitoj de UN, tiel ke oni povos pozitive utiligi la lingvajn rimedojn de la organizaĵo. “Lingva diverseco ne estas nur problemo,” diris Tonkin, “sed ankaŭ pozitiva afero.” “Ideale, UN trovu internajn solvojn al lingva komunikado kiuj estas samtempe justaj kaj efikaj, kaj eksterajn lingvajn kanalojn kiuj ebligu komunikadon kun la popoloj de la mondo en iliaj lingvoj, por efikigi aŭtentikan dialogon.”

D-ro Tonkin estis invitita kiel fakulo pri lingvaj demandoj – rekono samtempe de la rolo de UEA en la stimulado de serioza kaj realisma debatado pri la lingva politiko de UN, kaj de nur flanka pritrakto de la pretendoj specife de Esperanto. Ĉi-lastata tamen okazis, precipe en la postprelega diskutado inter la trideko da partoprenantoj. Montriĝis ke inter tiuj personoj estis almenaŭ unu iama lernanto de Esperanto, kaj ke la fina rezulto de la kunveno estis nepre pozitiva ankaŭ por nia lingvo.

Optimismo kun defio

Unu studento demandis: “Ĉu vi estas optimisma pri la estonto de Esperanto?” La respondo estis mikso, en kiu unu el la pozitivaj elementoj estis la kreskoj en la ĉina movado tra la lastaj jaroj. Tio donis perfektan enirpunkton por la defio: “Ĉi tiu lando, Barato, spertas similan kreskon kaj evoluon, tiel ke la kondiĉoj ekzistos por iom komparebla fortigo de la movado en Barato, se ni nur trovos la aktivulojn por antaŭenigi la aferon.”



Ja tiuj demando kaj respondo okazis en la angla lingvo, kadre de prelego ‘Esperanto – lingvo por dialogo kaj paco’, farita de la vic-prezidanto de UEA, Stefan MacGill, al studentoj de la Universitato Azim Premji en Bengaluro. Estas malgranda universitato, kun 800 studentoj kaj 100 instruistoj kun limigita studfakaro: pri la sociaj sciencoj, edukado, sociaj evoluigo kaj politiko. Do, tre konvena studentaro por reagi pozitive al la mesaĝo de Esperanto.

La elektita temo koincidis kun la Semajno de Gandhi, festata tra la lando kaj en tiu universitato. Do, la prezentaĵo tuŝis tiun respektatan sed ne precize difineblan nocion – la internan ideon. La studentoj estis jam bone informitaj pri Esperanto – kelkaj el ili ja parolas la lingvon kaj partoprenis en la 4a Sudazia Seminario (SAS) la semajnon poste. Ili estas membroj de Esperanto-grupo kiu ĉiusemajne renkontiĝas en la universitato sub la gvido de d-ro Giridhar Rao. Do, la nuna prezentaĵo ne devis komenci de la nula punkto, anstataŭe ĝi faris iujn konstatojn pri la ecoj de la parolkomunumo, kiuj estas malsamaj al tiuj de naciaj aŭ etnaj lingvoj – malmultaj denaskaj parolantoj, alveno al la lingvo pro koscia decido, limigita lingva nivelo pro neintensa uzo, limigitaj infrastrukturo kaj financaj rimedoj ktp.

Venis interesaj kaj defiaj demandoj – do dudirektiĝis la defioj – ekzemple pri la motivoj aŭ kialoj por homoj okupiĝi pri la lingvo, kaj la limigitaj plustudaj ebloj por altigi siajn konojn. Entute interesa kaj stimula sesio, kiu ja estis filmita. Kun kelkaj el la studentoj la diskuto daŭris en suba manĝejo, parte en Esperanto, interalie pri la planoj por la 4-a SAS. Pri la Esperanto-agado en tiu universitato, unika en Barato, la tutmonda movado ne estas sufiĉe informita.

Ekskurso en Nepalo

La Nepala Esperanto-Asocio anoncas 11-tagan specialan ekskurson okazontan inter la 26-a de februaro ĝis la 8-a de marto 2018.

Ĉiuj scias ke NEspA okazigas la Himalajan Renkontiĝon, ĉiun duan jaron (ĉi-jare ni sukcese okazigis la 12-an). La Himalaja Renkontiĝo signifas plejparte piedvagadon en la montaro, sed tio ne taŭgas al ĉiuj aĝgrupoj. Multaj samideanoj volas viziti Nepalon, sed timas tian marŝadon. Jen jam trian fojon ni okazigos, do, ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj, atingeblaj per buso kaj situantaj piede de belaj pejzaĝoj, inkluzive la famajn montarojn videblajn en Katmanduo, Ĉitlang-Daman, Ĉitaŭan Nacia Parko, Lumbini (la naskiĝloko de Budho), Ŝirubari (tre fama hejmlogado en Nepalo) kaj Pokhara.

La nepala Esperanto-movado kreskas pli kaj pli, kaj se anoj de NEspA ne povas viziti eksterajn landojn – pro la kosto – almenaŭ eblas inviti amikojn el aliaj landoj tien ĉi. Kaj tio montriĝas fakte efika programo. La ĉefa celo de la programo estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke.

Nepalo estas ebriiga miksaĵo: fascina lando de antikva historio, viglaj kulturoj kaj popoloj, biodiverseco kaj majestaj pejzaĝoj. Ĝiaj geografiaĵoj etendiĝas de belaj altaj neĝpintoj en la nordo, al malpli altaj montoj en la mezo kaj al bela, fekunda ebenaĵo kun multaj arbaroj en la sudo. Situante inter Tibeto (Ĉinio) kaj la Ganga Ebenaĵo (Barato), Nepalo, tra sia historio sentis la influon de ambaŭ tre diversaj civilizacioj, sed samtempe kreis identecon por si mem. La lando havas preskaŭ 28 milionojn da homoj, parolantaj 125 lingvojn aŭ dialektojn.

Okdek procentoj de la nepala popolo sekvas hinduismon, sed la lando estas oficiale sekulara, kaj fakte, lando de multaj religioj. La templo de Paŝupatinath en Katmanduo estas unu el la kvar plej gravaj lokoj por adorantoj de Ŝiva. La Budho, la “Lumo de Azio”, naskiĝis en Lumbini, kiu situas en la suda ebenaĵo, estante plej sankta celo por pilgrimantoj.

La multaj etnoj ofte kultas proprajn diojn. Kvar lokoj de Nepalo estas agnoskitaj de Unekso kiel mondheredaĵoj. En la unua, la valo de Katmanduo, reliefiĝas la urbo de Bhaktapuro, la reĝaj placoj de Katmanduo kaj Patano, la stupaoj de Svajambunath kaj Baŭdhnath, kaj la temploj de Paŝupatinath kaj Ĉangu Narajan. Dua kultura heredaĵo estas Lumbini. Plie estas la naturaj zonoj Everest Nacia Parko (1.148 km²) kaj Reĝa Ĉitaŭan Nacia Parko (932 km²), kiun ni vizitos dum la ekskurso.

Historio

Dum sia historio de kelkmil jaroj, Nepalo travivis diversajn reĝajn dinastiojn. La plej antikva estis la Kiratoj, kiuj regis de la 9-a jarcento a.K. ĝis la 1-a jarcento p.K. Laŭ legendoj menciitaj de kronikistoj, la Budho vizitis Katmanduon en la sepa reĝado de la sekva dinastio, la Liĉavioj, kaj la imperiestro Aŝoka venis al la valo kaj konstruis kvin stupaojn en kaj ĉirkaŭ Patano. Dank' al tre granda surskribita ŝtona kolono konstruita tie, oni scias, ke Aŝoka vizitis ankaŭ Lumbinin. La Liĉavioj regis de siaj palacoj en Katmanduo de la 1-a ĝis la 9-a jarcento p.K. Neniu el tiuj konstruaĵoj restas, sed oni trovas epigrafojn kaj skulptaĵojn faritajn tiam diversloke en la valo.

Post la Liĉavioj venis la dinastio Malla, komence unuigita sed poste disfalonta en tri regnojn. Ankaŭ dum tiu tempo tre riĉaj kulturaĵoj estis kreitaj, el kiuj multaj ankoraŭ ekzistas. Poste venis la dinastio Ŝaha. De ĝia bazo en Gorka (100 km nordokcidente de Katmanduo) ĝi etendis sian potencon ĝis la valo de Katmanduo, kaj poste unuigis la tutan teritorion de

Nepalo. Nun Nepalo estas senreĝa lando.

La valo de Katmanduo

Je alteco de ĉirkaŭ 1.300 metroj super la marnivelo, la valo de Katmanduo entenas la ĉefurbon kaj estas ankaŭ la komerca kaj kultura centro de Nepalo. Ĝi kovras 360 km² en formo de ovo ĉirkaŭita de verdaj montoj, mezurante 24 km orientalokcidente kaj 19 km nordalsude. Pasintece la valofundo estis kovrita de lago. Laŭ legendo la bodisatvo Manĝuŝri venis de Ĉinio kaj tranĉis la sudan monton por lasi la akvon elflui. Poste li kreis la unuan loĝantaron. La valo havas grandan nombron da etnoj, el kiuj la nevaranoj estas la elstara. Tiuj establis la dinastion Malla kaj kreis ties imponajn artaĵojn.

La urbo Katmanduo dekomence estis fandopoto, kaj tio klarigas ĝian riĉan kulturon. Ĝi havas unikan urboplanon – kvartalojn centritajn sur temploj kaj internaj kortoj. Ĉiam ĝi estis fonto de inspiro por multaj artistoj kaj skribistoj, kaj post la malfermiĝo de Nepalo en 1950 ankaŭ por multaj homoj el la tuta mondo.

Ĉitlang-Daman

Daman estas fama turista vizitejo en Nepalo. Ĝi situas 70 kilometrojn sud-okcidente de Katmanduo je alteco de 2400 metroj super la marnivelo. Panoramo de la ĉefaj okcidentaj kaj orientaj pintoj de la Himalajo inkluzive Dhabalagiri kaj Ŝagarmato (Everesto) videblas de tie ĉi. Daman estas fama ankaŭ pro sunleviĝo de malantaŭ la montaro kaj aliaj belaj naturaĵoj. Daman estas eta vilaĝo sed centro de turismo por plej bona vido de Himalajo, de kie vi povas vidi Dhaulagiri en sudo al monto Everesto en oriento. La vilaĝo havas botanikan ĝardenon kaj plurajn religiajn templojn.

Ĉitaŭan Nacia Parko

Ĉitaŭan Nacia Parko estas la plej fama ircelo en Nepalo por turistoj, kiuj volas ĝui ĝangalan naturon. Ĝi estis deklarita kiel nacia parko en 1973, kaj en 1984, de Unesko, monda naturheredaĵo. La parko ofertas protekton al 50 specioj da mamuloj inkluzive de unukornaj rinoceroj, bengalaj tigroj, leopardoj, bradipoj, sovaĝaj elefantoj, striitaj hienoj, delfenoj kaj arbaraj bubaloj. En la parko videblas almenaŭ 526 specioj da birdoj, 126 specioj da fiŝoj, 150 specioj da papilioj kaj 49 specioj da reptilioj. Aktuala studo montras, ke triono de la nepalaj tigroj estas en Ĉitaŭan.

Lumbini

Ŝakyamuni Budho naskiĝis en Lumbini, en la suda parto de Nepalo, antaŭ 2.500 jaroj. De tiu tempo, Nepalo estas sankta loko por budhanoj. Lumbini estas malgranda urbo en la suda ebenaĵo, kie ruinoj de la malnova urbo ankoraŭ videblas. La Budho naskiĝis en reĝa familio. Lia patrino, la reĝino Maya Devi, songis pri lia alveno. Ensonge ŝi vidis blankan elefanton kun naŭ dentegoj veni al ŝi de la ĉielo kaj eniri ŝian korpon. Kiam la tempo de la naskiĝo proksimiĝis, ŝi ekiris al la gepatra domo, laŭ kutimo de la tempo. Survoje ŝi naskis Sidhartha Gaŭtama en la ĝardeno de Lumbini. Ni vizitos la templon dediĉitan al Maya Devi kaj la templojn konstruitajn de diversaj landoj en la mondo.

Ŝirubari

Ŝirubari estas fama nomo por la vilaĝa turismo en Nepalo. Turistoj el diversaj landoj ĝuas viziti ĝin. Ŝirubari gajnis premion en kategorio de kultura heredaĵo en 2001. Ĝi situas en la montaro je 1700 metroj super la marnivelo kaj la loĝantaro estas tute Gurungoj, la etna grupo mondfama kiel Gorkha.

Turistoj loĝas en privataj domoj kun puraj litoĉambroj kun necesejo. La manĝoj estas bongustaj kaj vi manĝos kun familianoj. La komunumo donas ĝojon per tradiciaj dancoj kaj kantoj de Gurung-komunumo. Vi povas ankaŭ partopreni en la kultura programo, kiu estas vivanta kulturo, kiun vi spertos kaj ĝi donas ne forgeseblan impreson en via tuta vivo. La vilaĝo estas pura kaj vilaĝanoj traktas la gastojn kiel dioj.

Pokhara

Kviete ripozante ĉe la piedo de la majesta Annapurna Himalajo, la valo de Pokhara staras je 827 metroj super la marnivelo. Se Katmanduo estas la kultura centro de Nepalo, Pokhara estas ĝia aventura centro. De ĝi komenciĝas la klasikaj piedvojoj al Ĝomsom kaj la trisemajna Annapurna rondiro. Por nepiedvagantoj la valo ofertas montarajn vidindaĵojn kaj ekvidojn de la kampara nepala vivo. La turista centro ĉe la laga bordo etendiĝas ĝis la sudorienta limo de la valo. Tie oni povas ĝui la sunon, manĝojn, muzikon kaj aliajn distraĵojn. La vidindaĵoj de Pokhara valo: la montara fono, Pheva lago, Seti Gandaki rivero, Mahendra kaverna, muzeoj ktp.

RevuServo 2018

La jarfino alproksimiĝas kaj nun estas tempo por mendi revuojn.

Bonvolu pagi rekte al nia konto reg 3409, konto 645 7274, indikante la kodo(j)n kaj memoru ke la limdato por enpago estas

la 1-a de decembro 2017

ĉar poste ne eblos transigi la sumon antaŭ la 31-a de decembro.

Dankon !

Kodo	Nomo	Abonprezo DKK
OdE	Ondo de Esperanto	120.– – NUR RETE
NV	Naturista Vivo	120.–
LJ	La Jaro	48.–
JA	Juna Amiko	135.–
Mon	Monato	425.–
BA	Beletra Almanako	315.– – 3 numeroj en 2018



Kopenhagaj DEA-anoj! Ne maltrafu la venontjaran KUKS-festivalon! Jen indoneziaj dancistinoj kiuj distris la publikon dum la ĉi-jara.

